MODELTESTO DE LA EKZAMENO
UEA-KER C2
PAROLA PRODUKTADO
TASKOFOLIO

---

Vi partoprenos en diskutrondo de imagita Scienca Kongreso pri via ekzamentemo.

Preparu kaj prezentu **vian 6-8 minutan kontribuon**, en kiu vi traktu la temon el vidpunkto de via vivtereno, vivsituacio eventuale kun komparo kun aliaj spertitaj aŭ konataj aŭ dezirataj sistemoj. Aldonu ĉiam vian propran **prijuĝon**.
Zorgu pri riĉa kaj varia **enhavo**, pri la logika **strukturo**, pri la abunda kaj temrilata **leksiko**. Estu lingve **preciza**. Parolu **elegante** kaj **konvinke**.

Post via prezentado la publiko (= ekzamenantoj) havos demandojn por **precizigi** kelkajn detalojn aŭ **diskuti** novan subtemon.Tiu **interparolo** daŭros **6-8 minutojn**.

Vi disponas pri 20 minutoj por prepari vian prelegon.
Dum la prezentado vi rajtos uzi viajn notojn.

Vi povas elekti el du temoj.
Viaj lotumitaj temoj: Eduksistemo / Dependeco

*Akireblaj poentoj: 40*